



ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

junio 2020



ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

**OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA
KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ**

Volumo 27[2] numero 139 junio 2020

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio

Redaktistoj: Terry Manley, Andrew Woods

Provlegantoj: Vera Payne, Donald Rogers

Kontaktadreso: esk@esperanto.org.au

AEA – ESK

GPO Box 2122

Melbourne, Victoria 3001

Australia

Abonoj kaj pasintaj numeroj

Esperanto sub la Suda Kruco estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa). Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA: www.esperanto.org.au / info@esperanto.org.au

NZEa: www.esperanto.org.nz / esperantonewzealand@gmail.com

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk@esperanto.org.au. Ni preferas ke vi sendu artikolojn en simpla teksto, kaj fotojn en bonkvalitaj versioj kaj aparte. Se vi havas bildnotojn, klare indiku, kiu bildo respondas al kiu noto, kaj marku en la teksto la lokojn de bildoj aŭ diagramoj, se la ordo gravas.

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

15-a de aŭgusto 2020

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo. Por la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2020 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj.

ISSN 2207-0087

Sur la kovrilo

Centra Brisbano nokte

(Pixabay, 6350145)

Aliaj bildatribuoj

p4 [freeaustriestock.com](https://www.freeaustriestock.com) p5 Josh Lim (Sky Harbor) [CC BY-SA 3.0], Florentino Floro [PD] p22 Pixabay, liuksena

enhavo

- 04 Antaŭparolo
- 05 Kiel vojaĝi tra Metropola Manilo
- 06 Nia Aŭklanda Tagekskurso
- 10 Vojaĝo suden al Milford Sound
- 12 Iom pri mia vojaĝo al NZ
- 13 Antaŭ 250 jaroj...
- 14 Kampara vivo en urbcentro
- 17 Ĉu Zamenhof vere mortis?
Kaj kio pri Churchill?
- 21 Kolonelo William Light,
la fondinto de Adelajdo
- 22 La fido de la pasero
- 24 Nia unua virtuala Kongreso

ANTAŬPAROLO

Sentas pli pace en mia angulo de la mondo. Trafiko maldensiĝas. Urbcentro silentas. Familianoj promenis la hundojn. Paroj laŭiras la vojetojn apudriverojn aŭ promenantaj aŭ biciklantaj. La aero ŝajnas pli pura. Nenia soneto de superfluganta aviadilo. Ĉio paŭzas. Atendante. Necerte pri kio okazos estonte. Ĉu unu tagon, semajnon, monaton aŭ jaron ĉi tio daŭros?

Mi renkontis najbarinon mezaĝan dum ŝi promenis la hundon kaj mi babilis kun ŝi. Mi demandis al ŝi kiel la nunaj cirkonstancoj influas ŝian laboron kaj vivon. Ŝi respondis, "Ne multe. Mi laboras ĉe hejme per komputilo, ĝuas ĝardenumadon kaj la kvietan hejmvivon."

Kaj mi respondis "Jes, estas same por mi. Ĝi ne influas mian vivon multe. Mi ofte biciklas ien kaj reen, kaj oni konsideras tion ekzercadon, kaj tio estas permesebla. Mi volontulas ĉe la komuna ĝardeno, kaj prizorgas la plantojn laŭ la rivereto, kaj oni permesas tian laboron. Do ja ne efikas sur min."


Sed ŝi respondis, nemalice, "Sed vi estas el la generacio kiu mortas. Ja povus influi vin!"

Subite estis rememorigo pri mia aĝo. Kiel mi forgesas tion?

Multajn dankojn al Jonathan Cooper kiu lastatempe ĝisdatigis la AEA-retejon. Do iru al aea.esperanto.org.au kaj kontrolu ĝin por scii, kio okazas en la aŭstralia movado nun.

Kompreneble aktuala fonto por e-okazoj estas la bulteno de Roger Springer—*Aŭstraliaj Esperantistoj*. Gratulon al li pro tiu daŭra kaj grava laboro.

TERRY MANLEY



Kiel mi vojaĝu tra Metropola Manila?

Franciska Toubale

Metro Manila estas la plej ofta anglalingva nomo de la Nacia Ĉef-urba Regiono de la Filipinoj. La plej facila maniero iri de unu punkto al alia en tiu urbaro de pli ol 12 milionoj da loĝantoj—preskaŭ duono de la loĝantaro de Aŭstralio—estas kompreneble per taksio. Ili estas relative malkostaj por eksterlandano el pli riĉa lando, kaj komfortaj kun klimatizilo. Sed vi estas izolita kaj ne vere povas senti la etoson de la ĉiutaga vivo.

Ekzistas ankaŭ trajnoj. La linio 1 kaj la linio 2 estas oportunaj sed la linio 3 ofte problemas. En la trajno estas vagonoj nur por virinoj. Kiam mi vidis la sagon “por virinoj”, eble pro mia sperto en araba lando, mi tuj ektimis, pensante ke mi devas apartiĝi de mia gvidanto. Sed ne, laŭvole vi povas uzi unu parton de la trajno aŭ alian. La pasaĝeroj afable tuj proponas sidlokon al maljunuloj aŭ al junaj virinoj kun bebo. Multaj bone regas la anglan kaj ofte demandis min kien mi iras kaj certigis ke mi ne mistrafis la celatan haltejon. Avantaĝo de la trajno estas ke neniu trafikstopilo bremsas ĝian rapidecon.

Alia ebleco estas trafi buson. Necesas bone koni la sistemon, scii la finstacion de ĉiu buso, kaj ne timi elbusiĝi en la mezo de la vojo. Nokte, kiam aparte la linio 3 ne plu funkcias, buso estas bona elekto. Ĝenerale ili ebligas la vojaĝanton atingi lokon sufiĉe malproksiman de sia deirpunkto.

Por malpli longa iro eblas trafi jeepney. Ĝi

estas loka buseto kun malkutima aspekto. Ne eblas ĝin mistrafi pro la brilaj eksteraj koloroj kaj oftaj ornamaĵoj. La pasaĝeroj eniras per la ŝtupetaro ĉe la malantaŭa parto kaj sidas vid-al-vide sur la du benkoj, kiuj laŭiras la flankojn de la veturilo. Kiam iu alvenas, oni puŝas sin kontraŭ la najbaro por fari lokon. La novalveninto murmuris al la apuda sidanto kien li volas halti kaj donas sian monon, kiu de mano al mano atingas la ŝoforon. Nekredeble lerte tiu ĉi kapablas kaj ŝofori kaj redoni la moneron, se necese. Ne estas varme en la

jeepney ĉar pro manko de fenestroj konstanta trablovo refreŝigas la aeron. En kelkaj partoj de la urbo, stratoj estas nur por tiaj veturiloj. En Metropola Manila ĉiam necesas elpeni rimeдон por venki la densan trafikon.

Fine por mallonga veturo mi rekomendas rikŝon. Ili facile troveblas apud trajnhaltejo aŭ bazaro. Je la unua vido vi pensas ke ĝi ne estas sufiĉe granda, kaj fakte averaĝe la filipinanoj ne estas altaj homoj, sed tio estas eraro. Vi kaj viaj pakaĵoj povas facile eniri kaj vi rapide atingos vian celon.

Bedaŭrinde la junulara kongreso planita en Quezon, en unu el la ur-

boj de *Metro Manila*, estas prokrastita kiel tiom da aliaj eventoj pro la kronviruso. Dum vi ripozas hejme por respekti la regulojn pri spaco inter homoj, vi povas pensi pri la estonto; kaj kial ne pri vojaĝo al Metro Manila por sperti tieajn diversajn transportilojn?



Supre: Trajno de la Linio 2.

Malsupre: Jeepney.



Nia Aŭklanda Tagekskurso

Kam Lee

Dum la Aŭklanda Kongreso de 2020, grupo da Esperantistoj aŭtobuse iris al la marborda regiono, okcidente de Aŭklando. La komencloko estis la kongresejo en Monto Roskil en la suda parto de Aŭklando. Ni veturis 14 km okcidenten en la Montaron Waitakere al la **Arataki-Vizitejo**, kiu situas 18 km sudokcidente de Aŭklando.

La Arataki-Vizitejo estas duetaĝa konstruaĵo, kies arkitekturo havas maorian stilon. La maoria vorto *arataki* signifas "kondukti" aŭ "gvidi". Ĉe la antaŭo de la konstruaĵo staras dek unu metrojn alta maoria *pou* (stango), kiu reprezentas maoriajn praulojn. La ligna stango estas unu el la plej grandaj en Nov-Zelando.

En la konstruaĵo estas ekspozicioj pri la maoria kulturo kaj pri la ekologio de la proksima medio. Mi interesate rigardis maoriajn lignajn ĉizaĵojn, faritajn el la nov-zelanda indiĝena arbo, la kaŭrio, kiu estas unu el la plej grandaj kaj plej longvivaj arboj en la mondo.

La sekva parto de la ekskurso estis 12-kilometra aŭtobusa veturo okcidenten al **Mercer-Rondo**, cirkla promenovojo. Nuntempe, 19% de la kaŭriaj arbaroj en la Montaro Waitakere estas infektitaj de *kauri dieback*, kiu estas arba malsano.

La kaŭriaj arbaroj en Mercer-Rondo ne havas la malsanon, pro protektaj agadoj. Lavstacioj kaj naturoficisto atendas ĉe la enirejo de la promenejo. Ĉe la komencloko,



Esperantistoj staras sur verando ĉe la unua etaĝo de la Arataki-Vizitejo, kiu situas 18 km sudokcidente de Aŭklando. La foto estis farita dum la Aŭstralia-Nov-Zelanda Esperanta Kongresa tagekskurso, la 14-an de januaro 2020. Mi fieras esti la farinto de ĉi tiu grupfoto, ĉar post kiam mi premis la fotilan 20-sekundan prokrastbutonon, mi devis rapide kuri laŭ la 80 metroj de la piedvojo kaj ŝtuparoj.

mi estis petita forigi la grundon sur la tegaĵo de miaj ŝuoj per mato havanta grandajn brosojn. Poste mi devis ŝpruci kaj lavi miajn ŝuojn per malinfektaĵo.

Mi piediris laŭ la promenvojo, kaj ĉe rigardejoj, oni povas vidi la altajn klifojn kaj belan marbordon. Pro manko de tempo mi ne povis piediri la tutan cirklan vojon, kaj mi revenis per la jam laŭirita, sed nun laciga kruta vojo. Bedaŭrinde, mi ne vidis la interesan kaj belan Mercer-Plaĝon, kion mi rimarkis nur post la fino de la ekskurso. Eble estos alia okazo en la estonteco!

La aŭtobuso kun la grupo veturis 3,5 km norden laŭ kruta kaj serpentuma vojo, al la tria vizitloko, **Piha-Plaĝo**, kiu situas 1,4 kilometrojn rekte norde de Mercer-Rondo.

Piha-Plaĝo estas bonkonata loko por surfado, kaj la bela loko certe povas esti tagekskursita vizitloko. La suno brilis inter la lanugaj blankaj nuboj kaj mi vidis norde la imponan Leonorokon, kiu estas vulkana ŝtopilo, formita antaŭ 16 milionoj da jaroj. La roko havas altecon de 101 metroj, sed pro rokfalado, alteco de nur 50 m estas atingebla per piediro laŭ kruta piedvojo.

Mi piediris dum malalta tajdo laŭ la granda nigra sabla plaĝo, kiu estas 400 metrojn longa kaj 100 metrojn larĝa. La koloro estas pro la granda enhavo de fero, kiu havas vulkanan originon. Mi vidis naĝantojn en la loko kie oni rajtas naĝi, kiu estis markita per ruĝaj kaj flavaj flagoj, kaj kontrolata de plaĝoficistoj.

Populara Nov-Zelanda realeca televidprogramo estas *Piha Rescue* ("Piha-a Savado"), kiu temas pri la vivo de plaĝoficistoj de Piha-Plaĝo, problemoj de kaŝitaj fortaj marfluoj tirantaj naĝantojn marmezon, ĝenerala plaĝsekreco kaj la graveco de



Ni paŭzas dum ni piediras laŭ la Mercer-Rondo, kiu estas 1,6 km longa. Fone estas klifoj kaj parto de la okcidenta marbordo de la Norda Insulo de Nov-Zelando.

naĝado inter la flagoj. La televidprogramo daŭris 12 seriojn dum dek kvar jaroj.

En Aŭstralio estas aŭstralia versio de la televidprogramo, kun la nomo *Bondi Rescue*, kiun mi kelkfoje ĝuis rigardi.

La kvara ircelo estis Uru-Artgalerio en la aŭklanda urbocentro, sed pro manko de tempo kaj la ebleco de densa trafiko, nia ircelo estis ŝanĝita al **Cornwall-Parko**.

Ekskursita komentariisto parolis pri la historio de la loko, dum la aŭtobuso veturis preter la observatorio, historiajn konstruaĵojn, belajn ĝardenojn kaj grandegajn gazonojn.

La parko havas areon de 270 hektaroj kaj en la komenco je 1901, John Logan Campbell (1817–1912), la tiama urbestro de Aŭklando, donis 90 hektarojn al kuratoro. La parko, komence, estisejo por ĉevalrajdi kaj ludi golfon, sed post la komenciĝo de la dua mondmilito, ambaŭ agadoj estis malpermesitaj.

Post la fino de la komentario, oni povis aŭ reveni aŭtobuse al la kongresejo, aŭ piediri al la supro de la proksima **Unuarba Monteto** (aŭ **Maungakiekie**, "monto de la grimpoplanto *kieke*") kaj piede reveni al la kongresejo, kiu estis rekte du kilometrojn for.

Mi kaj aliaj elektis la piediron, ĉar la mon-

teto fakte estas neaktiva vulkano kaj plejprobable ĝi estas la sola vulkano, kies supron mi transiros en Nov-Zelando. La helpema veturigisto direktis la aŭtobuson al la haltejo plej proksima al la monteta supro.

Mi kaj aliaj forlasis la buson kaj ni dum 20 minutoj piediris feliĉe al la supro de Maungakiekie, kiu estas 182 metrojn alta vulkana monteto, erupciinta proksimume antaŭ 60 000 jaroj. De la pinto oni povas vidi la aŭklandan urbocentron, kiu estas 6 km for. Sur la pinto mem staras obelisko kun bronza statuo de la maoria batalisto Tamaki. Ĝi estis konstruita en 1940, sed ne oficiale malfermita ĝis 1948. La ceremonio estis prokrastita pro maoria kutimo ke tiaj aferoj estu prokrastataj dum militoj, kaj tiam okazis la dua mondmilito.

La obelisko estis konstruita laŭ la testamento de Campbell por omaĝi al la Maoria popolo, kiu estis prognozita formorti en la proksima estonteco. Eĉ antaŭ lia morto, la prognozo evidentiĝis eraro: la Maorioj vigle supervivas nuntempe. Do la temo fariĝis la centjariĝo de la Traktato de Waitangi.

La angla nomo "One Tree Hill" estis

donita de li al ĉi tiu monteto, ĉar dum la eŭropana ekkoloniado de Aŭklando kreskis indiĝena arbo proksime al la supro. La indiĝena arbo en 1852 estis forhakita de eŭropdevena koloniisto. Ĉu ago de intenca vandalismo aŭ nur por akiri brullignon?

Neindiĝena kalifornia pino (*Pinus radiata*) estis kreskigita tie dum la 1870-aj jaroj. Poste oni provis kreskigi indiĝenajn arbojn, sed okazis nur malsukcesoj.

La monteto fariĝis pro du atakoj tute senarba en 2000. Je la 11-a de junio 2016 okazis plantado de naŭ junaj arboj, de la specioj *tōtara* kaj *pōhutukawa*, kies gepatroj kreskis sur la monteto.

Interesa rokmuzika anekdoto ekzistas pri la historio de la kanto "Unuarba Monteto", el la U2-a albumo de 1987, *The Joshua Tree*. En 1984 la mondkonata rokgrupo U2 vizitis Aŭklandon dum sia "Unforgettable Fire Tour" ("Turneo de Neforgesebla Fajro") tra Nov-Zelando kaj Aŭstralio. La rokgrupo renkontis Nov-Zelandanon, Greg Carroll, kiu amikiĝis kun Bono (Paŭlo Hewson) kaj lia grupo.

Lun vesperon, Greg helpis ilin iri al la Unuarba Monteto, kaj Bono tre ŝatis la lokon.



Esperantistoj staras en norda parto de Piha-Plaĝo; fone estas Leonoroko. La alteco estas 101m. (La supro ne estas grimpebla pro rokfalado.)

Poste Greg fariĝis sceneja helpanto de la grupo dum koncertoj ĉie en la mondo, sed en 1986 li mortis pro motorcikla akcidento en Dublino. Poste, la kanto "Unuarba Monteto" estis komponita, kies lirikon verkis Bono memore al Greg Carroll.

Poste ni revenis piede tra la ondo-abundaj verdaj gazonoj de Cornwall-Parko, laŭ antaŭurbaj stratoj, kaj finfine tra alia bela parko al la kongresejo. Hodiaŭ sendube estis ĝoja memorebla travivaĵo.



Esperantistoj staras ĉe rigardejo, kiun mi povis rigardi dum mi paŭzis ĉe loko en la antaŭa foto. Maldekstre estas partoj de la grandaj maraj klifoj.



Suda regiono de Piha-Plaĝo. La dekstra grandega rokego estas Taitomo-Roko, kiu situas ĉe Taitomo-Insulo. Piha-Plaĝo situas 1,4 km norde de Mercer-Rondo, sed la serpentina aŭtomobila vojo inter la du lokoj estas 3,5 km longa. Piha estas 39 km okcidente de Aŭklando.



Sur la supro de Unuarba Monteto. Fone estas Aŭklando. La distanco inter la pinto kaj la urbocentro estas 6 km. La distanco inter la pinto kaj nia kongresejo estas 2,3 km, aŭ 3 km piede.



Mi estas en Cornwall-Parko kaj mi staras sur flanko de la vojo al Unuarba Monteto (kies maoria nomo estas Maungakiekie). La alteco de la vulkana pinto estas 182 metroj.

Vojaĝo suden al Milford Sound

Heather Heldzingen

Post la tre ĝuinda kongreso en Aŭklando en januaro, Emma Breuninger kaj mi vojaĝis vagonare, unue al Velingtono en tre komforta trajno tra ege bela kamparo. Ni tranoktis en Velingtono kaj poste trafis la pramŝipon al Picton. Ni refoje trafis vagonaron al Christchurch kie ni tranoktis du noktojn. Dum nia resto en Christchurch, Erin McGifford bonkore ŝoforis nin (kaj Indrani Beharry-Lall) tra la urbo kaj al multaj interesaj lokoj inkluzive la havenon kaj Sumner-Plaĝon.

En Christchurch ni vizitis la memortabulon al Kate Sheppard la sufrageto, kiu instigis la registaron doni la rajton por virinoj voĉdoni en la landaj balotadoj. En septembro 1893 Nov-Zelando estis la unua lando en la mondo kie virinoj gajnis tiun rajton.

Ni rimarkis ke en la urbo la katedralo kaj aliaj grandaj konstruaĵoj ankoraŭ ne estas renovigitaj post la granda tertremo. En

preskaŭ ĉiu strato estas terpeco uzata kiel parkejo, kie antaŭe estis domoj aŭ aliaj konstruaĵoj.

Ni vizitis bestĝardenon kie ni havis la eblecon vidi kivitajn (ne la homojn sed la birdojn!) Tamen pro la mallumo de ilia loĝloko, ni ne povis foti ilin. Sed ni povis foti esperantajn porkojn—la Kunekune-ajn porkojn!

Post du tre agrablaj tagoj ni adiaŭis Christchurch por aŭtobusa vojaĝo al Queenstown, kie ni ankaŭ vidis okulfrapajn pejzaĝojn tra tiu belega parto de la mondo. Dum nia vojaĝo la vetero ĉie estis milda kaj agrabla.

Vojaĝante per aŭtobuso ni atingis la fjordon Milford Sound kaj poste vojaĝis sur la fjordo per krosŝipo.

Kun pezaj koroj ni forlasis tiun belan landon de la longa blanka nubo por nia vojaĝo al Sidnejo kaj poste al Tasmanio.





Erin, Indrani kaj Emma ĉe Sumner-Plaĝo



La katedralo en Christchurch



Kate Sheppard
(1848–1934)



Erin McGifford kun la memortabulo pri Kate Sheppard. Ellen helpis pri la aranĝo de la skulptado.



Societema Esperantlingva porko?



La vetero iom malboniĝis dum nia krozado sur la fjordo.



Fokoj sur rokoj en la fjordo Milford

Iom pri mia vojaĝo en Nov-Zelando

Indrani Beharry-Lall

Ĉiam kiam mi ĉeestas Esperantajn renkontiĝojn, ĉu kongresojn aŭ UK-ojn, mi provas krome vojaĝi por ĝui pli de la loko kaj lando.

Mi jam dufoje vizitis Nov-Zelandon, sed nur la Nordan Insulon kaj antaŭ pli ol 25 jaroj. Do antaŭ la kongreso mi dum unu tago vojaĝis al Paihia, Golfeto de Insuloj, kie ĉe Waitangi Treaty Grounds mi lernis iom pri la maoria kulturo kaj la Traktato de Waitangi. Poste mi vizitis Russell, kun ties malnovaj domoj, kaj lernis pri la historio de la unua marhaveno kaj unua kolonieto de eŭropevena popolo en Nov-Zelando.

Alia ekskurso estis al "Hobbiton" kie oni filmis la *Hobbit*-triologon. Ĉar la aspekto estis tiel kurioza, oni poste lasis la tutan areon kaj ne malkonstruis ĝin. Estis ĝi vere tute alispeca vidindaĵo.

Alia sperto estis vizito al la kavernoj de Waitomo. Ni malsupreniris en grandan kavernon, iris per boato sur rivereto, kaj dume silente kaj en tuta mallumo rigardis la trembrilantajn lumvermojn super ni — nekredeble!

Post la kongreso mi pasigis kelkajn tagojn ĉe amikino kiu loĝas ekster Velingtono. Dum vizito al Naturrezervejo Nga Manu, krom vidi diversajn indiĝenajn plantojn, arbojn kaj birdojn, mi ĝojis rigardi — en mallumo sed ankoraŭ videblan — kiviidon.

Sekvis vizito al la Suda Insulo, per pramo de Velingtono al Picton kaj poste seshora trajnvojaĝo al Christchurch. Longa veturo sed belegaj pejzaĝoj kaj elvidaĵoj kiujn mi kunĝuis vojaĝante kun Heather Heldzingen kaj Emmi Breuninger.

La sekvantan tagon Erin McGifford tre profesie gvidis nin al multaj turistaj lokoj, ekzemple la nacia monumento honore al Kate Sheppard, kiu estis la unua virino (en la tuta mondo) kiu sukcese kampanjis por virinaj voĉdonrajtoj; al diversaj konstruaĵoj detruitaj de tertremo; kaj al la marbordo en Haveno Sumner de Lammington kaj Wil-

lowbank-Sovaĝnaturparko.

Mi poste trairis la botanikan ĝardenon, kie estas grandegaj arboj, belegaj floroj, kaj tute neatendite: la Mondpaciga Sonorilo, la ununura en Nov-Zelando. Fakte nur kelkaj urboj tra la tuta mondo havas tian sonorilon. Do tio estis tre surpriza malkovro!

La sekvantan tagon mi partoprenis kvin-tagan ekskurson vojaĝante tra Lago Pukaki, Monto Cook, kaj Cromwell, al Queenstown.

Mi restis tie dum tri tagoj, ĝuante la ferian etoson ĉe la marbordo. Estis 30°C! Mi iris per gondolo al la pinto de monto kie mi faris mian unuan memfoton. Alian tagon per boato mi trairis la fjordon Milford. Ĉar pluvus la antaŭan nokton, estis multe da akvofaloj, kaj ni boatis preskaŭ sub la plej granda akvofalo, 90 metrojn alta. Ni kompreneble malsekiĝis, sed por ni tio ŝajnis nur ridinda afero. Kial oni ridas kiam oni malsekiĝas pro naturaj kaŭzoj?

La sekvanta etapo estis vojaĝo tra Lago Wanaka kaj laŭ la okcidenta marbordo al Glaĉero Franz Jozef. La belaj vidindaĵoj survoje memorigis min pri Brita Kolumbio, Kanado.

Mi antaŭe pensis ke mi eble povus iom grimpi sur la glaciamaso, sed tio tute ne eblis. La glaĉero dum jardekoj retiriĝis parte pro klimatoŝanĝo. Kaj ankaŭ tiam pluvus kaj min trafis malvarmumeto...

Ni reiris al Christchurch tra Greymouth kaj de tie per trajno.

La lastajn du tagojn mi gastis ĉe Erin. Ni luncis kun la loka Esperanta grupo, kaj kiel fino ni ĉeestis maorian spektaklon: ili unue akceptis nin en sian vilaĝon, poste klarigis al ni pri manĝaĵo kaj kutimoj, kaj fine prezentis dancojn, kantojn kaj... la Haka-on! Ĝi estis kompreneble prezento por turistoj, sed tre bone elpensita kaj farita.

Por mi tio estis belega fino de mia ferio en Nov-Zelando!

Antaŭ 250 jaroj...

Terry Manley

Estis antaŭ pli ol 250 jaroj kiam kaptano Cook [pron. *Kuk*] velŝipis tra la Pacifika Oceano cele al observado de la transiro de Venuso trans la sunorbo. Tahitio estis la elektita loko por tiu observado scienca. Sed laŭ aliaj la vojaĝo celis al pli ol scienca esploro. Ĝi celis ankaŭ esploradon de landmasoj por Anglujo.

Dum aprilo kaj majo ĉijare, ĉar estis prezice 250 jaroj post la vojaĝo de Cook, mi legis taglibrojn de Cook kaj liaj kunvo-

loko estas hejmo por indiĝenaj familioj dum miloj da jaroj. Scio pri la lando kaj la maro herediĝis tra la generacioj. Cook ne malkovris Aŭstralion. Nia popolo estis jam ĉi tie. Cook havis nek rajton nek konsenton doni al nia marbordo anglajn nomojn."

La indiĝena nomo por ĉi tiu loko estas Munda Bubul.

Pro la ege klera navigado kaj la ŝipestrado de Cook, historio iel diigas lin. La indiĝenaj ĉefoj en Havajo faris same kiam

Cook alvenis al ties insuloj. Por nuligi tion inter la tribanoj la ĉefoj fine mortigis lin.

Certe la vojaĝoj de Cook ege elstaras en la kroniko de historio; sed ĉu li estis la unua Eŭropano kiu esploris la orientan marbordon de Aŭstralio? Laŭ iuj, ne. Inter tiuj estis la pentristo **George Collingridge** (1847–1931), kiu dediĉis jarojn de sia vivo kaj multan monon por establi, ĉu aliaj Eŭropanoj alvenis pri frue al la orienta parto de Aŭstralio. George estis Esperantisto kiu fondis la

unuan Esperanto-klubon en NSK en 1905. Poste K. G. McIntyre kaj Peter Trickett eldonis librojn samtemajn. Tiuj kredas ke proksimume 250 jarojn antaŭ la vojaĝo de Cook, Mendonça, portugala ŝipestro, jam esploris la orientan marbordon.

Konsiderante ke Portugaloj estis en la regiono, nun konata kiel Indonezio, en 1512, kaj superis tie kiel komercistoj ĝis la alveno de la Nederlandanoj preskaŭ cent jarojn poste, estas kredinde ke ili iam faris esplorvojaĝojn en la regiono. Ili jam velŝipis al Ĉinujo en 1511. Sed pro konkurso kontraŭ Hispanujo kaj aliaj eŭropaj landoj la vojaĝoj estis sekretaj.

Peter Trickett en sia libro *Beyond Capricorn* ("Preter Kaprikorno") arigis multajn pruvojn por konvinki la leganton ke Portugaloj ja vizitis Aŭstralion antaŭ 500 jaroj. Unu el tiuj pruvoj estis trovita de scien-



jaĝantoj Joseph Banks kaj Sydney Parkinson. Certe la fokuso de Cook estis plej ofte pri navigado kaj mapado de la landoj renkontataj. Banks kaj Parkinson pli detale priskribis la pejzaĝon kaj rakontis pri siaj aventuroj.

Sed kio pri la indiĝenoj? La Nacia Muzeo planis ekspozicion pri tiu vojaĝo laŭ la orienta marbordo de Aŭstralio, sed pro la privusaj limigoj devis nuligi la aferon escepte la interretan version. Do indiĝenoj kontribuis al tiuj paĝoj.

Je la 19-a de aprilo 1770 ŝipano Hicks vidis landpinton aŭstralian. Honore al li Cook nomis ĝin Terpinton de Hicks.

Cook skribis: "La plej sudan terpinton ni vidis... Mi nomis tion, Terpinto de Hicks, ĉar Leŭtenanto Hicks estis la unua kiu malkovris ĉi tiun landon."

Komentoj de la indiĝenoj: "Tamen ĉi tiu

cistoj Roberts kaj Ward apud Fraser-Insulo, Kvinslando en 1976. Dum scienca esploro, ili trovis, en tavolo de sablo submara, fiŝretpezilon el plumbo. Zorge kalkulante la aĝon de tiu tavolo per kuntrovaĵoj ili taksis ke la pezilo lokiĝis tie inter antaŭ 400 kaj antaŭ 600 jaroj. Kiel ĝi atingis tien tiam? Analizante la plumbon en la pezilo, ili trovis ke ĝi fontis el mino en suda Francujo. Malgraŭ tia verŝajne grava eltrovaĵo, neniu akceptis publikigi la informon en ĵurnalo ĝis 1999. Tio aperis en *Archeology of Oceania* en marto 1999.

Alia mistero estis rokmuro apudmara sur la suda marbordo de NSK. Ĉe Bittangabee, sude de la Haveno de Twofold, sufiĉe granda muro troviĝas kun iuj ŝtonoj

metron longaj. La Naciaparkuloj, kiuj nun estras la terpecon, asertas ke ĝi apartenas al domo de balenkaptistoj de ĉ. 1840. Jes la balenkaptistoj konstruis domon tie en tiuj jaroj, sed ili uzis la ŝtonojn el tiu granda elipsforma muro kiu estis sub angulo de la domo. La muro antaŭdatumas la domon. Trickett konjektas ke Portugaloj aŭ travintris tie aŭ estis forlasitaj sur la strando.

Do, ĉu dum oni sopiras prui teorion, oni alsaltas al ĉiu spureto por helpi la pruvon? Dum mi legis la libron de Trickett mi konvinkiĝis pri lia teorio, eble pro simpatio al mia samideano George Collingridge. Do ĉu mi faras same alsaltante eblajn spurojn?

Imagu kion mi pensas kiam mi legas la sekvan historieton el la nova brita kolonio

Kampara vivo en urbcentro

David Ryan

Mi ofte diras al mia edzino ke mi volas loĝi en la kamparo. Mi ne komprenas kial, ĉar dum mia tuta vivo mi loĝis en grandaj urboj (Christchurch, Wellington, Londono ktp). Tamen, lastatempe, mi komencis ĝui veran kamparan etoson ĉi tie apud la centro de la ĉefurbo de Nov-Zelando.

Wellington estas ĉirkaŭata de ne tiel altaj montetoj (iomete simile al Hobarto). Mi loĝas je 5 kilometroj de la urbcentro—je 55 minutoj piede aŭ 5–10 minutoj aŭtomobile. Je la fino de nia strato komenciĝas eta vojo kiu serpentumas laŭ la montetoj malantaŭ nia domo. Mi komencis promeni en la montetoj antaŭ kelkaj jaroj. Mi eĉ promenis 18 kilometrojn dum unu tago. Tamen, lastatempe dum nia deviga hejmrresta periodo pro la kronviruso, mi nun promenas ĉiutage. Mi vidas ŝafojn, ĉevalojn, bovojn, kaj milojn da kuniĝoj; kaj, kiam la tago estas sennuba, mi vidas klare la Sudan Insulon.

Mi konstatas ke Velingtonanoj estas tre bonŝancaj, ĉar la kamparo estas tre proksima al la urbcentro kaj niaj domoj. Mi faris la ĉi-kunajn fotojn je nur 2–3 kilometroj de mia domo, aŭ ni diru je malpli ol 10 km de la Parlamentejo. Estas facile vidi

ke oni povas trinki kafon en urbcentra kafejo kaj, nur kelkajn minutojn poste, oni povas ĝui freŝan kamparan aeron en la montetoj ĉirkaŭ nia urbo kaj saluti la bovinon kiu donis lakton por nia kafo!




en Aŭstralio. El la taglibro de David Collins, vicguberniestro de la nova kolonio en Sidnejo, 1795:

“Je la monاتفino indiĝenoj akordigis aferojn de honoro ĉe konvena loko apud «brikkampo». Tiuj kiuj loĝas ĉe la suda parto de la golfo de Botany venigis kun si strangulon de eksterordinaraj aspekto kaj karaktero. Eĉ ties nomo laŭsone estis nekutima, Gome-boak. Li vojaĝis dum

tagoj de sia loĝloko fore en la sudo. Laŭ alteco li estis malpli ol 5'3" (1,57 metrojn), sed ja la plej muskola, ortotrajta kaj bonforma indiĝeno iam renkontita en la lando. Li batalis bone. Liaj lancoj estis rimarkinde longaj kaj li defendis sin per ŝildo kiu kovris la tutan korpon.”

Do de kie venis ĉi tiu strangulo, kaj kial li kontraste aspektis kaj batalis kompare al siaj indiĝenaj kunuloj? Enigmo.





Ĉu Zamenhof vere mortis? Kaj kio pri Churchill?

Renato Corsetti

Certe ili ambaŭ mortis sed ne iliaj ideoj, kiuj daŭre produktas efikojn. La ideoj de Zamenhof estas resumeblaj per egaleco inter ĉiuj popoloj. La ideoj de Ĉerĉil estas resumeblaj per la ideoj de la libera merkatismo. Ĉi tiu artikolo esploras pri la malhelpoj al Esperanto en la libermerkataj ekonomioj. Ne temas pri persekutoj kontraŭ danĝera lingvo sed pri malhelpoj kontraŭ lingvo kaj ideo kontraŭa rilate al la mondordo, kiun ili celas. Tiuj malhelpoj ĉefe konkretiĝas per antaŭenigo de alternativa projekto. Mia centra tezo estas, ke la malhelpoj al Esperanto fare de Francujo kaj poste de la anglalingva mondo estis pli efikaj kontraŭ Esperanto ol la abomenaj persekutoj kontraŭ homoj fare de naciismaj registaroj.

1. En la 19-a jarcento: Rasaj ideoj kaj imperiismo

Oni scias, ke la 19-a jarcento, la naskiĝ-jarcento de Esperanto, estis jarcento de firmigo kaj ĝeneraligo de la konceptoj pri naciaj ŝtatoj en la kontinenta Eŭropo. Tiu estis ĝenerala pensofluo, kiu influis ĉiujn en tiu epoko, inkluzive de homoj, kiel Zamenhof, kiu tamen favoris la malon, tio estas la disfalo de la "obstinaj baroj inter la popoloj dividitaj."

Komprenoble Zamenhof estis unu el tiuj homoj, kiuj ja sukcesas eskapi el la ideo ĉirkaŭaĵo de sia epoko. Lastatempa artikolo de islanda esploristo eĉ prezentas Esperanton kiel unu el la movadoj por kontraŭi la nacian movadon de la 19-a jarcento.

En tiu sama periodo en aliaj landoj kaj en kontinenta Eŭropo kaj en Britujo kaj iugrade en Usono la ĝenerala publika pensofluo estis konstruanta tute alispecan vidon pri la mondo, en kiu ne superregis ideoj pri frateco kaj interfratiĝo, sed ideoj pri rego fare de la blankuloj super la cetera mondo. Tiuj ideoj estis prezentitaj tiel malkaŝe, ke nun estas malfacile eĉ akcepti, ke la situacio estis tia

kaj tiel kontraŭesperantisma en la faktoj. Temis evidente pri imperiismo, kiel lasta stadio de kapitalismo laŭ la esprimo de Lenin.

Kiam temas pri Britujo, la 19-a jarcento estas konata kiel la jarcento de la fina konstruado de la brita imperio. Nenio pli ol la asertoj de publikaj figuroj tre influaj de tiu periodo povas klarigi la specon de etoso tiam reganta. Ni komencas per Sesil Rodz [Cecil Rhodes], ege influa homo en Britujo dum la dua duono de la 19-a jarcento (Cetere omaĝe al li la lando Rhodesia ricevis sian nomon.)

"Rhodes pensis pri sekreta elito de anglaj-saksaj homoj dediĉitaj, kiel la filozofiistoj de Platono, porti aŭtoritaton kaj ordon al la tuta mondo, kiuj regos aliajn popolojn por ilia bono mem. Ĉi tiuj dediĉitaj junaj homoj devis esti eltiritaj el Britujo, Norda Ameriko kaj Germanujo, ĉar Rhodes rigardis tiujn landojn ne nur kiel vere blankaj sed ankaŭ destinataj por mondo-regado." Tiel diras biografio pri li. Sed ne temis nur pri li. Temis pri ĉiuj. Ekzemple Ĝon Raskin [John Ruskin], la plej alte taksita artisto de la 19-a jarcento en Britujo, diris en sia inaŭgura parolado en Oksfordo: "Estas nun destino ebla por ni, la plej alta iam ajn metita antaŭ nacio, kiun ni povas akcepti aŭ rifuzi. Ni estas ankoraŭ nedegenerinta raso, raso miksitita de la plej pura norda sango... Anglujo... devas fondi koloniojn kiel eble plej vaste..."

Klare ĉiuj planoj de Rhodes, de la brita registaro kaj de aliaj koncernatoj en Britujo konsideris kiel lingvon de la estonta imperio nur la anglan. Nenio alia esti eĉ pensebla. Revoj pri egaleco kiel tiuj kunligitaj kun Esperanto tute ne trovis lokon en la rasisma-imperiisma sinteno de la epoko, en kiu Esperanto naskiĝis.

Sed komprenoble en tiu periodo tia sinteno ne nur regis en Britujo. Ni devas almenaŭ ekzameni la imperiismajn ideojn en Francujo.

En Francujo ni havas ankaŭ formalan da-

ton pri la naskiĝo de la imperio post la revolucio. Temas pri la 18-a de majo 1804, dato de la deklaro de Napoleono esti imperiestro de la francoj.

La sekvoj de ĉi tiu imperio estas bone konataj. Malpli konataj estas la sekvoj kulturaj kaj lingvaj. La francoj, kiel ĉiuj imperiistoj, klopodis disvastigi la francan kulturon kaj la francan lingvon. La disvastigo de la lerneja sistemo laŭ la principoj de la revolucio helpis pri tio. Ekzemple per dekreto de la 4-a de julio 1810 en la konkeritaj slavaj teritorioj ĉiuj komunumoj devas havi lernejon por knaboj kaj ĉiuj distrikto devas havi lernejon por knabinoj. Pluraj liceoj, superaj lernejoj, estas antaŭviditaj kun la instrulingvo nur franca. Multaj ilirianoj estas sendataj al la universitatoj en Francujo.

En la dua duono de la jarcento dum la tiel nomata dua imperio, la kolonia puŝo de Francujo intensiĝis. Finfine la kolonia franca imperio, kies surfaco estis malpli granda ol 300 000 kvadrataj kilometroj en 1851, havos surfacon de pli ol 1 000 000 kvadrataj kilometroj en 1870.

Kompreneble francoj estis pli rigoraj pri la apliko de siaj konceptoj en la kolonioj, kaj la franca iĝis la lingvo devige instruata en ĉiuj lernejoj de la francaj kolonioj, dum angloj ne agis en tiu maniero sed fidis je sia forto por enkonduki la anglan. La franca ĉiukaze estis prioritare instruata al la infanoj de la lokaj elitoj aŭ de la tribestroj.

Kompreneble malantaŭ tio estis la rasismaj ideoj, kiuj floris en la dua duono de la 19-a jarcento precipe en Francujo. Artur Degobino [Arthur de Gobineau] (1816–1882) disvastigis la ideon en *Essais sur l'inégalité des races humaines* [Eseo pri la malegaleco de homaj rasoj] de 1855, ke la raso hinda-eŭropa estis la prapatro de ĉiuj estraj klasoj de Eŭropo, kaj aparte de la francaj nobeloj (al kiu li apartenis).

Apartan situacion ni trovas en tiu periodo en Usono. Certe ankaŭ tie ekzistis ideoj pri supereco de blankuloj, kiel la rilatoj al la nigroloj ĵus liberigitaj el sklaveco pruvas, sen bezono pri literaturaj citaĵoj, sed la konstruado de usona imperio en la fino de la 19-a jarcento estis nur en sia komenca stadio, kaj pro tio ni povas preteratenti tiun landon nun.

Kiel ni scias Esperanto naskiĝis en Orienta

Eŭropo kaj disvastiĝis tie kaj poste en Okcidenta Eŭropo. Pri Britujo esencan rolon ludis tiu sama W. T. Sted [Stead]. Efektive W. T. Stead, estis tre malkonformisma homo, kiu subtenis multajn famaferojn, estis en malliberejo pro artikoloj kontraŭ prostituado en Britujo, ktp.

Same en Francujo la akcepto de Esperanto okazis fare de individuoj ne influataj de la ĝenerala «kontraŭesperanta» mondorigardo.

2. En la Ligo de Nacioj: la unua vera persekuto de Esperanto

La agado por Esperanto ĝuis belan periodon en la komenco de la 20-a jarcento ĝis la unua mondmilito. Ne necesas citi apartajn verkojn pri tio. Ĝenerale konataj estas la unua monda kongreso en Bulonjo-ĉe-maro en 1905, la postaj kongresoj interalie en Britujo kaj eĉ en Usono en 1910 kaj la fondo de Esperantogrupoj tra la tuta Eŭropo kaj parte tra la mondo.

Post la interrompo pro la granda milito en Eŭropo la agado por Esperanto revenis kun granda energio, sed tiam la Esperantomovado ricevis la unuan seriozan baton. Ĉifoje la persekutanto estis Francujo.

Je la fino de la unua mondmilito, kunlige kun la packonferenco en Versajlo [Versailles] en la jaroj 1919–1920 oni fondis la Ligon de Nacioj, oficiale la 28-an de junio 1919. Temis pri la unua versio de internacia organizaĵo por solvi internaciajn problemojn kaj eviti militojn.

Jam en la posta jaro, la 19-an de decembro 1920, 11 delegitoj prezentis proponon pri rezolucio pri Esperanto. Malantaŭ la propono estis la agado de la jura konsilanto de la persa delegito, la poste tre fama esperantisto Edmond Privat. La reago de la franca delegito estis tre malfavora. Bonvolu konsideri nur la jenajn vortojn: “Jam ekzistas internacia lingvo: la franca, universale instruata ĉie en la mondo de la penso.” Tiu franca delegito estis grava franca politikisto, iama ministro pri eksterlandaj aferoj, kiu, kiel la ministro pri publika instruado Léon Bérard, timis la konkurencon de Esperanto por la rolo de internacia lingvo, kiun tiam havis la franca. La ministro eĉ malpermesis

la instruadon de Esperanto en ejoj apartenantaj al la francaj lernejoj. Ili evidente ne perceptis, ke la rolo de la franca jam estis minacata de la angla. Ĉiukaze la propono estis forŝovita al la Ĝenerala Konferenco de la posta jaro.

Malgraŭ la favora raporto de la Ĝenerala Vic-sekretario Inazo Nitobe, kiu vizitis la tiujaran Universalan Kongreson en Prago, kaj malgraŭ la subteno de 13 delegitoj: Suda Afriko, Rumanujo, Persujo, Belgujo, Ĉeĥoslovakujo, Kolombio, Ĉinujo, Finnlando, Albanujo, Japanujo, Venezuelo, Hindujo kaj Pollando (kun kelkaj kondiĉoj), pro la daŭra kontraŭstaro de Francujo oni akceptis la raporton sed sendis al la Internacia Komitato por Intelektala Kunlaborado la ŝlosilan parton, tio estas la rekomendo pri instruado de Esperanto en la lernejoj de la membraj ŝtatoj.

Tie la franca reprezentanto Rejnald [Reynald] deklaris, ke li ricevis instrukciojn malaprobi la proponon, kaj tio finis la debaton. Iusence la francoj sukcesis haltigi Esperanton en ties plej bona momento, kiun oni poste neniam plu reatingis pro la naciismaj kaj naziaj registaroj en Eŭropo, la dua mondmilito, la malvarma milito, la rolo de la angla, ktp.

3. Ceteraj okazaĵoj en la sama periodo en anglalingvaj landoj

Se la francoj ne rimarkis ke la angla komencis okupi poziciojn en la areno de internaciaj lingvoj, la angloj pluiris laŭ siaj «imperiaj» ideoj ankaŭ post la unua mondmilito. Kiam mi diras “la angloj” tio devas esti komprenata kiel la reganta angla elito kaj la konservema parto de la publika opinio.

En la dudeka jarcento la pure rasismaj konsideroj de la antaŭa jarcento estas forlasitaj sed ne la ideoj pri la supereco de la angla civilizo.

Ideojn pri tiu supereco havis C. K. Ogden. En 1925 li produktis sian *Basic English* (Baza angla), plene priskribitan en libro aperinta en 1930. Temis pri ideo disvastigi en pli facila maniero la konon de la angla lingvo al ĉiuj. Ogden estis konvinkita, ke la mondo bezonas malaperigi malgrandajn lingvojn laŭgrade kaj uzi laŭeble nur unu, la anglan en formo simpla aŭ kompleta.

La afero estis vaste konata en Britujo kaj laŭdata kiel maniero alproprigi la anglan al tiuj bedaŭrinduloj, kiuj ne posedas ĝin de naske. Vaste konata libro de 1933 pri tio estas la libro *The Shape of Things to Come* de H. G. Ŭelz [Wells].

Temas pri scienc-fikcia verko pri la historio ĝis la jaro 2016. En tiu verko *Basic English* estas la interlingvo de la estonta mondo, mondo en kiu post longaj bataloj tutmonda aŭtoritata registaro sukcesas unuigi la homaron kaj devigi ĉiujn lerni tiun lingvon kiel duan lingvon.

Ĝoĝ Orŭel [George Orwell] estis unu el la subtenantoj de *Basic English* ĝis 1945, kiam li iĝis kritika pri ĉiuj internaciaj lingvoj. Sed tio, kio plej impresas, estas ke la projekto *Basic English* estis aparte atentata, eĉ dum la dua mondmilito, de la brita registaro, kiu evidente vidis en ĝi ilon por disvastigi la anglan lingvon kaj kulturon.

En 1943 Ŭinston Ĉerĉil [Winston Churchill] faris faman paroladon en la universitato de Harvard okaze de la ricevo de honora titolo. Tiu parolado estas ofte citata pro la peceto kiu sekvas (nia traduko kaj nia aldonita emfazo): “Ni antaŭeniru kiel pri aliaj demandoj kaj pri aliaj decidoj similaj laŭ celo kaj efiko – ni antaŭeniru sen malbonvolo al iu ajn kaj kun bona volo al ĉiuj. Tiaj planoj ofertas multe pli bonajn kompensojn ol forpreni provincojn aŭ landojn de aliaj popoloj aŭ ekspluatante subtenon ilin. **La imperioj de la estonta tempo estos la imperioj de la menso.... Antaŭ kelkaj monatoj mi konvinkis la Britan Ministraron starigi ministran komitaton por pristudi la Basic English kaj raportu pri ĝi. Jen konkreta plano.**” Tiu plano sonoras, laŭ mi, kiel la mortosonorilo por la Esperanto-movado, sen bezono pri persekutado de esperantistoj sed per simpla superforto per plano, kiu celas la malon kaj kiu estas apogata de la registara potenco de Britujo kaj Usono. Mi kutimas, je la diro “Ni ne estas malamiko de la angla”, respondi: “Bone. Sed la angla en la realo estas malamiko de Esperanto, se ĝi celas transpreni la rolon de Esperanto kiel monda interlingvo.” Tion klare diris Churchill en tiu parolado.

Intertempe ekestis ankaŭ la *British Council*, la oficiala organo por zorgi pri la angla eksterlande. En 1934 funkciuloj de la Minis-

terio pri Eksterlandaj Aferoj de Britujo kreis la *British Committee for Relations with Other Countries*. La nomo estis poste mallongigita en 1936 al *British Council*.

4. En la dua duono de la 20-a jarcento

La historio de tio, kio okazis en ĉi tiu periodo estas konata kaj bone dokumentita en la libro de Robert Phillipson, *Linguistic Imperialism*. En la lastaj 25 jaroj tiu libro estis kritikita el pluraj flankoj, sed neniu neas la imperiismajn agojn kaj faktojn prezentitajn. Oni simple interpretas ilin el alia vidpunkto, klarigante ke ne estis la anglalingvaj landoj, kiuj devigis la aliajn lerni la anglan, sed temis esence pri libera elekto de la aliaj landoj mem por sia propra avantaĝo.

Nenio esence nova el la teoria vidpunkto okazis ek de la jaro 1950, sed nur praktika realigo de la jam esprimitaj ideoj.

Sed kiel ni diris en la komenco okazis ĉefe daŭra aplikado de la agado en ĉi tiu kampo. Ĉiuj landoj, krom la komunismaj landoj, troviĝis, kiel diris ŝerce meksika ŝtatprezidanto pri Meksiko "malproksimaj de Dio kaj proksimaj de Usono." Mi devas ankaŭ diri, ke kun tre malmultaj esceptoj la regantoj de la aliaj landoj aktive kunlaboris. Oni notis nur la nekunlaboron de la francoj, kiuj provis ankorau teni la francan kiel internacian lingvon.

La rezulto de ĉi tiu agado estas jam sub la okuloj de ĉiuj. La angla estas instruata ĉie en la mondo kaj ĝi transprenas laŭgrade la rolon de interlingvo, pri kiu revis Zamenhof rilate al Esperanto. Nun la esprimo en la angla estas «lingua franca».

La agado de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj en ĉi tiu kampo neniam atingis la punkton de tiu ĉe la Ligo de Nacioj kaj la lingvaj rajtoj neniam estis akceptitaj kiel homaj rajtoj, malgraŭ la mencio pri lingvo en la artikolo 2. Ekzistas nur unu studo realigita pro peto de UN pri diskriminacioj surbaze de interalie lingvo. La studo agnoskas, ke tiaj diskriminacioj ekzistas, sed neniu praktika paŝo estis entreprenata.

Do anglalingvaj landoj eĉ ne devis uzi sian vetoo-raĵton por malhelpi diskutadon pri Esperanto, ĉar neniam oni alvenis al tiu diskuto.

Ĉu la persekutoj de Hitler kaj Stalin en la

fino estis pli danĝeraj al la ideo de internacia, neŭtrala planlingvo ol la nepersekuto sed zorgado pri alternativa projekto anoncita de Churchill?

5. Realisma konkludo

Ĝis nun mi montris kiel en la kampo de instalado en la mondo de interlingvo inter homoj apartenantaj al malsamaj lingvogrupoj la projekto Esperanto malsukcesis kaj la projekto "angla lingvo kiel dua lingvo por ĉiuj" sukcesis.

La Esperanto-movado nuntempe ankoraŭ ekzistas kaj laboras por Esperanto, sed ĝi estas la ombro de tio, kio ĝi estis en la komenco de la pasinta jarcento, kiam temas pri publika agnosko. "Ĉu Esperanto ne jam formortis?" Tion demandas de vi parto de la homoj, kiuj iam aŭdis pri ĝi. La alia parto ne demandas, ĉar ili neniam aŭdis pri ĝi.

Esperanto disvastiĝis tutmonde sed restas tre margena fenomeno. Ĝi adaptiĝis al la novaj retaj komunikeblecoj kaj iom reviviĝis pro la interreto, kiu donas al individuoj la potencon komuniki.

Certe la ideo pri justa kaj neŭtrala solvo en la lingva kampo restas kiel bela idealo, kiu tamen ne trovas en la nuna mondo multajn sekvantojn. Sed la plej granda parto de la mondo pensas, ke prefere oni lernu la lingvon de la plej granda fortulo de la momento.

Tamen la historio ne finiĝis kaj la nuna situacio de monda krizo pro la mondvasta epidemio pro la kron-viruso, jam montris al ĉiuj, ke la mondo estas unu kaj ke ĝi ne bezonas militon kaj perforton sed pacon kaj kunlaboron por solvi la komunajn mondajn problemojn, kiaj estas la monda epidemio sed ankaŭ la problemoj pri plivarmiĝo de la ter-globo, la mizero de miliardo da homoj, la manko de sanservoj por ĉiuj, kaj multaj aliaj.

La mondo, kiu reformiĝos post la fino de la problemoj de la kron-viruso, certe estos alia mondo, kaj en tiu alia mondo malpli perforta kaj pli solidara la rolo de Esperanto kiel lingvo de paco kaj kunlaboro ne favoranta iun el la popoloj de la mondo certe havos pli grandan estontecon, kaj fine realiĝos la roloj de Zamenhof pri egaleco kaj kunlaboro inter la popoloj.

Kolonelo William Light, la fondinto de Adelajdo

Katja Steele

Unu el la plej konataj figuroj de la sudaŭstralia historio estas kolonelo William Light, la viro kiu kreis la planon de Adelajdo. Li naskiĝis kiel la unua infano de kapitano Francis Light kaj la portugala-siama Martina Rozells la 17-an de aprilo 1786 en Kuala Kedah (Malajzio). Kiam sesjaraĝa li estis sendita al lernejo en Anglio. Esti miksrasa donis al li kelkajn malavantaĝojn, do li aliĝis al la armeo kaj lernis desegni mapojn. La fakto, ke lia patrino "ne estis blanka" igis lin labori pli forte ol ĉiu alia.

Ankoraŭ en Anglio li konis Maria Gandy kaj ŝian familion. Ŝi (kaj du el ŝiaj fratoj) faris kun li la grandan ŝipvojaĝon (per la ŝipo *Rapid*) al la tiam nova kolonio Sudaŭstralio, kaj ŝi iĝis lia flegistino ĝis lia morto. Kiam la ŝipo alvenis al Sudaŭstralio, Maria havis dudek kvin jarojn, Light kvindek. Ĉiu konis ĉiun en la malgranda setlejo kaj oni rapide stampis Maria kiel la "amorantino de Light", kvankam ŝi estis probable nur sindediĉa dommastrino. La unua loko kie li metis sian tendon estis ĉe rivero Torrens. La ligna domo staris ĉe la kruciĝo de North kaj West Terrace (kie li komencis la termezuradon-planadon). Nur iom poste li konstruigis al si domon, kiun li nomis "Theberton" (en la nuna antaŭurbo de Adelajdo, Thebarton).

Kiel la unua ĉeftermezuristo de la nova brita provinco Sudaŭstralio, Light mapis

kaj markis la areon de la kaŭrna lando konata kiel Tarndanya, kreante urbon kun larĝaj stratoj kaj belaj parkoj ĉirkaŭe konatan kiel Adelajdo (establita en 1836). Li komencis sian termezuristan laboron la 11-an de januaro 1837.

Light havis longajn batalojn pri la plej bona loko por la urbo Adelajdo kun la unua guberniestro de Sudaŭstralio, Hindmarsh, kaj aliaj. Bedaŭrinde tiuj ĉi malakordaĵoj finiĝis per la rezignado de Light kaj ili for-

tiris la atenton de la brilaj kvalitoj de Light. Li estis homo kun multaj talentoj: soldato, maristo, muzikisto, artisto. Sed en amo kaj sano li estis malbonŝanca. Lia unua edzino mortis, la dua forlasis lin.

Li sciis, ke la tuberkulozo mortigos lin kaj ke li ne vidos la kreskon de Adelajdo. Light forpasis la 6-an de oktobro 1839. Post la pompa ŝtata funebra ceremonio, la unua de Sudaŭstralio, li estis entombigita en la nuna Placo Light en la ĉeesto de multaj miloj da funebrantoj.

Nemultaj scias, ke Light estis ankaŭ artisto. Li partoprenis kelkajn ekspoziciojn, sed dum la fajrego de lia kabano en

la angulo de la nunaj West Terrace kaj North Terrace en 1839 preskaŭ ĉiuj liaj taglibroj, notkajeroj kaj artaĵoj forbrulis. Nefinita memportreto travivas en la artgalerio de Sudaŭstralio. Postmorte li ricevis honoran membrecon de la Reĝa Sudaŭstralia Societo de Artoj.



La fido de la pasero

rakontita de Bob Felby



Estis preparata la bataalkampo de Kurukŝetro por ke estu facila la movado de mamuto kun grandegaj kavalerioj. Ili uzis elefantojn por elterigi arbojn. Paserino vivis sur unu el tiuj arboj. Ŝi havis kvar junajn idojn. Ŝia nesto kun la kvar idoj surteriĝis kiam la arbo estis eltirata el la grundo. Sed la junaj idoj, kiuj ankoraŭ ne sciis flugadi, restis mirakle nevunditaj.

La atakebla kaj timanta pasero ĉirkaŭrigardis esperante trovi helpon. Ĝuste tiam ŝi vidis Kriŝnon, kiu, kune kun Arĝuno, ĉirkaŭrigardis la bataalkampon. Ili volis fizike ekzameni la bataalkampon kaj plani kiel plej bone venki en la milito.

Ŝi movis siajn etajn flugilojn por kiel eble plej rapide atingi la ĉaron de Kriŝno.

"Bonvolu savi miajn infanojn, ho Kriŝno," la paserino petegis. "Se ne, morgaŭ, kiam la milito komenciĝos, ili ĉiuj estos mortigitaj."

"Mi bone aŭdas vin," respondis la ĉion scianta, "sed mi ne povas malhelpi la leĝojn de la naturo."

"Mi scias nur, ke Vi estas mia Savanto, ho Sinjoro. Mi lasos la sorton de miaj infanoj en Viaj manoj. Vi povas aŭ mortigi ilin aŭ savi ilin. Nun estas Via elekto."

"La rado de la tempo blinde moviĝas." Kriŝno parolis kvazaŭ li estus ordinara homo, kiu nenion povus fari.

"Mi ne scias vian filozofion," respondis la paserino kun fido kaj respekto. Vi estas la rado de la tempo. Nur tion mi scias. Mi kapitulacas al Vi."

"Tiam plenigu vian neston kun manĝaĵo por tri semajnoj."

Nesciante la konversacion, Arĝuno provis fortimigi la paserinion, sed Kriŝno ridetis al la birdo. Ŝi movis siajn flugilojn kelkajn minutojn obeante Kriŝnon, kaj refluĝis al sia nesto.

Du tagojn poste, ĝuste kiam la korno de Konĉo anoncis la komenĉiĝon de la batalo, Kriŝno petis Arĝunon pruntedoni al Li sian pafarkon kaj sagojn. Arĝuno estis surprizita, ĉar Kriŝno jam promesis ke Li ne levos iun ajn armilon en tiu milito. Kaj Arĝuno ja kredis, ke li estas la plej bona pafarkisto sur la bataalkampo.

"Ordonu al mi, Sinjoro," li diris, "nenio po-

vas kontraŭi miajn sagojn."

Trankvile prenante la pafarkon de Arĝuno, Kriŝno celis al unu el la elefantoj. Sed, anstataŭ ol mortigi la beston, la sago trafis la sonorilon kiu pendis ĉirkaŭ ĝia kolo, kaj ĉirkaŭflugadis fajreroj.

Arĝuno apenaŭ povis kaŝi sian ridon, kiam li vidis ke Kriŝno maltrafis tian facilan celon.

"Ĉu mi provu?" Li diris.

Refoje ignorante lian reagon, Kriŝno redonis al li la pafarkon dirante ke ne necesas pli da agado.

"Sed kial Vi pafis al la elefanto Keŝavo?" demandis Arĝuno.

"Ĉar tiu elefanto faligis la arbon en kiu estis la nesto de la pasero."

"Kiu pasero?" elkriis Arĝuno. "La elefanto estas nevundita kaj ankoraŭ vivanta. Nur la kolsonorilo estas detruita!"

Ignorante la demandojn de Arĝuno, Kriŝno petis lin blovadi sian konkegon.

Komenĉiĝis la milito. Sennombraj vivoj perdiĝis la venontajn dek ok tagojn. Fine venkis la Pandavoj. Refoje Kriŝno kaj Arĝuno iris por trovi la vojon tra la damninda kampo. Ankoraŭ kuŝis tie multege da mortintaj korpoj atendante sian entombigon. La bataalkampo estis kovrita de fortranĉitaj gamboj, brakoj kaj kapoj, senvivaj ĉevaloj kaj elefantoj.

Ĉe certa loko Kriŝno haltis, kaj rigardis malsupren al elefanta sonorilo.

"Arĝuno," Li diris, "bonvolu levi tiun sonorilon por Mi, kaj flankenmetu ĝin?"

Tiu ordono, kvankam simpla, estis malfacile komprenebla por Arĝuno. Malgraŭ ĉio, kial en tiu vasta kampo, kiu sendube bezonis purigadon, volis Kriŝno peti lin formovi sensignifan objekton el metalo? Arĝuno rigardis Kriŝnon demandante!

"Jes! Tiu ĉi sonorilo!" respondis Kriŝno.

"Ĝi estas la sama sonorilo, kiu devenis de la sama elefanto, al kiu mi pafis."

Sen pli da demandoj sin terenklinis Arĝuno por suprenlevi la pezan sonorilon. Tuj kiam li estis levinta ĝin, lia tuta mondo ŝanĝiĝis eterne.

Ĉirkaŭiris lin kvar etaj paseridoj kaj ilia dankema kaj fiera patrino!



Nia unua Virtuala Esperanto-Kongreso

07
JUN
2020

Jam antaŭ jaroj vi menciis la ideon, ke vintraj kursaroj, de kiuj adelajdanoj okazigis jam dek, povus esti organizataj ankaŭ en aliaj lokoj de Aŭstralio. Ĉu tiu ideo estis la komenca sparko por fari ĉi-vintre virtualan kongreson?

Jes. En la estraro de la asocio mi parolis pri multloka okazigo de vintrokursaroj, eĉ samtempa, kun reciprokaj utiligoj de prelegoj per la reto, sed neniu entuziasmis. Havi eksterlandajn prelegantojn estus unu el la ebloj, ĝis nun ne multe uzataj. La pandemio fermis nin en niajn domojn, sed la reto estas malfermita, la teknikaj eblecoj estas malmultekostaj, alireblaj al ĉiu kaj ni tre volonte utiligas ilin. Fine la estraranoj konsentis organizi unu komunan, tutlandan, virtualan eventon, kaj ni nomis ĝin, anstataŭ vintrokursaro, kongreso. Ni pridiskutis la teknikajn kondiĉojn kaj mi komencis la organizadon.

Ŝajne la afero evoluis rapide.

Ne estis apartaj obstakloj. La invitataj ek-

sterlandaj prelegantoj tuj jesis. Mi devis puŝi la aŭstralianojn pli ol la alilandanojn.

En la vintrokursaroj kaj kongresoj oni kutime havas ankaŭ instruadon.

Ankaŭ mi planis ĝin kaj Trevor Steele, Andrew Woods, Benno Lang kaj Paul Desailly konsentis gvidi lecionojn por interesiĝantoj. Ĉi-foje tio funkciis nur iomete. Dum la venontaj virtualaj kongresoj ni devos plibonigi tiun ĉi parton.

Teknike ŝajne ĉio iris glate.

Preskaŭ ĉio. La aŭdeblo estis kontentiga, ne estis gravaj fuŝoj. Fojfoje la prelegantoj iom luktis komence de sia prelego pri videbligo de bildoj aŭ tekstoj, kaj ne ĉiu sukcesis eniri la kvizojn (de Benno kaj Katalin). Estis kelkaj homoj, kiuj entute ne sukcesis ligiĝi al la kongreso probable pro problemoj en iliaj propraj komputiloj.

Komence de la kongreso estis Jonathan Cooper kaj vi la gastigantoj, sed post la



Duncan Charters: Esperanto dum KOVIM-19

<https://www.youtube.com/watch?v=ZtkeaIVEWHg>



*Marumi kaj Gary Smith:
La Enciklopedio de Adam Lindsay Gordon*

<https://www.youtube.com/watch?v=xyg8d0C0orY>

Respondas la Prezidanto de AEA, Sandor Horvath, al Katja Steele

tagmezo restis kaj la teknika prizorgado kaj la program-gvidado nur ĉe vi.

Jonathan multe helpis ankaŭ ĉe la varbado kaj informado, li metis anoncojn al Fejsbuko, Instagram kaj aliaj lokoj.

Por mi estis surprize, kiom multaj partoprenis la kongreson el eksterlando kaj ĉeestis ankaŭ aŭstralianoj, kiuj kutime ne kongresas. Kiom da partoprenontoj vi antaŭvidis?

Oni pagas ĉe Zoom aŭ por 100 ĉeestantoj aŭ poste por 500. Ni preferis pagi pli por ne devi iun ajn rifuzi, sed fakte la plej alta samtempa partoprennombro estis 98. Entute ĉeestis eble 140 homoj kaj ni ĝojas, ke ili venis el vere diversaj lokoj.

Kiujn konkludojn vi faris pri ĉi tiu sperto?

Venontfoje mi donus limdaton por aliĝo. Estis streĉe gvidi la programon kaj samtempe ricevi aliĝpetojn dum la evento. Mi ŝatas la ideon havi "malgrandajn ĉam-

brojn" por grupetoj de homoj, por ke ĉiu havu eblecon paroli. En la nuna kongreso la plejparto estis pasivaj aŭskultantoj.

Krome utilus fari detalan tempozonan horaron, ĉar ĉi-foje kelkaj homoj maltrafis iujn prelegojn pro malĝusta tempokalkulado. Sed mi ĉiukaze ĝojas, ke venis pluraj el tiuj, kiuj verŝajne ne venus, se estus ĉeesta, tradicia kongreso.

Gratulon kaj dankon, sinjoro prezidanto, mi ĝuis la kongreson. Kaj evidente ankaŭ la aliaj, ĉar la postevente ricevita mesaĝoj de plej diversaj partoprenintoj estas pozitivaj. Jen kelkaj el ili:

Ĉiu prelego estis instiga, interesa, kortuŝa, serioza aŭ amuza.

Je kvizoj kaj enketoj prelegintoj lerte uzis la retajn ilojn. Kaj la uzo de ripozĉambroj estis konvena.

Pro la ebleco resti hejme kaj fari aliajn taskojn inter la prezentadon (aŭ dum tiuj, kiuj min malpli interesas) mi neniam plu volas vojaĝi por ĉeesti konferencojn. :-)

Ĉu iam eblos reaŭskulti la prelegojn en Jutubo?


Estis bone vidi tiomajn aziajn-oceaniajn esperantistojn kaj multe da vizitantoj dise tra la mondo.



Katja Steele: Fama-nekonata virino el Adelajdo

<https://www.youtube.com/watch?v=91PAKwMn9RI>

Kaj pli...






*Keyhan Sayadpour: La pandemio
KOVIM-19 kaj la sansistemo en Irano*

<https://www.youtube.com/watch?v=pR08nW4jV2U>



*Trevor Steele: Taglibroj el la Infero:
kronikoj de Viktor Klemperer*

<https://www.youtube.com/watch?v=on-bkraos9E>



*Penny Vos: Montessori-edukado – Kiel ĝi
prezentas eblecojn kaj por kaj per Esperanto*

<https://www.youtube.com/watch?v=j1FP8EHx-KE>



Renato Corsetti: La angla kaj Esperanto

<https://www.youtube.com/watch?v=f50CpAwbhCQ>



JoMo: Kiel mi verkas miajn kantojn

<https://www.youtube.com/watch?v=fsK0vsXPd00>



*Katalin Kováts: Gravaj eroj pri
la instruado de Esperanto*

<https://www.youtube.com/watch?v=2MH00Tabrtw>

Trovu ĉiujn per ĉi tiu ligilo:

<http://aea.esperanto.org.au/eo/virtuala-1-taga-kongreso-2020/>

Australian Esperanto Association

GPO Box 2122
Melbourne VIC 3001
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4696 9293

Sandor Horvath | **President**
Jonathan Cooper | **Vice-President**
Heather Heldzingen | **Treasurer**
Esther Parris | **Secretary**

Committee Members:

Terry Manley, Indrani Beharry-Lall

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



Ivan Pivac | **President**
Chris Krageloh | **Vice-President**
David Ryan | **Treasurer/Secretary**
Dave Dewar | **Assistant Secretary**

Committee Members:

Erin McGifford, Bradley McDonald

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.

New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1150
New Zealand

www.esperanto.org.nz
esperantonewzealand@gmail.com
0800 350 781

